**I F E F - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**

# Fervoja mondo 2011/01

*(mesaĝo de Jindřich Tomíšek, 2011-jan-11)*

## El fervoja mondo 1/2011

**Belgio - Ĉeĥio - Francio - Hungario - Hispanio - Pollando - Svisio**

**Belgio : blanka libro de trafiko ankaŭ pri fervojo -** Gvidantaj estraranoj de tri ĉefaj eŭropaj fervojaj unuiĝoj renkontiĝis la 14-an de septembro 2010 en Bruselo kun eŭropa komisaro por trafiko *Siim Kollas*. Ili traktis kun li pri estonto de fervoja trafiko. Reprezentantoj de Unuiĝo de Eŭropaj Fervojoj (*CER*), Unuiĝo de Eŭropaj Gvidantoj de Fervoja Infrastrukturo (*EIM*) kaj Eŭropa Unio de Fervoja Industrio (*UNIFE*) prezentis komunan vidpunkton al preparata Blanka libro de trafiko. Tiu ĉi dokumento, fipreparata fare de la komisiono, difinas trafikan politikon de EU por venonta jardeko.
Dum renkontiĝo kun vicprezidanto *Kollas*, plenumdirektoro de *CER Johannes Ludewig*, prezidanto de *CER Mauro Moretti*, plenumdirektoro de *EIM Hendrik Abma*, vicprezidanto de *EIM Luc Lallemand*, ĝenerala direktoro de *UNIFE Michael Clausecker* kaj prezidanto de *UNIFE Hans-Jörg Grundmann* emfazis, ke fervoja sektoro povas ludi elstaran rolon en solvado de diversaj problemoj, kiujn trafiko en Eŭropo devas solvi : ekonomiajn efektivecojn, konserveblecojn, servojn al klientaro kaj sekurecon. Statistiko de Eŭropa Komisio konfirmas, ke fervojo notas malaltigitajn emisiojn de $CO^2$ kaj kompare kun aliaj trafikspecoj estas pli sekura.
Ĉiuj tri unuiĝoj estas konvinkitaj, ke nur tute nova politika kadro povas gvidi al ekonomie efektiva forigo de karbonemisioj en trafiko, precipe per enkonduko de unu devoliga celo por emisioj el trafiko kiel tutaĵo. Samtempe ili starigis sekvajn prioritatojn :
1) Kosta politiko kaj reguligo devas garantii kondiĉojn por laŭrajta konkurenco inter ĉiuj specoj de trafiko.
2) Pli bona kunlaboro inter unuopaj specoj de trafiko – estas bezonega subteno de kombinita trafiko.
3) Liberigo plialtigos efektivecon de fervoja sektoro.

4) Neĝisfinancado el flanko de la ŝtatoj malhelpus konkurencon.
5) Fervojo pretas kreski – sed kontraŭstaras al tio obstakloj en sfero de investoj en infrastrukturon, sekurigon kaj evoluigon de grandrapida fervoja trafiko.
6) Intersistema uzeblo en la tuta EU por funkcianta translima trafiko.
7) Agordiĝo de nekompatibilaj versioj de *ETCS*.

**Ĉeĥio : Stadler liveros novajn veturilojn por du regionoj -** En du internaciaj konkursoj por liveri sume 33 novajn motorvagonojn por regionoj *Liberec* kaj *Vysočina* Ĉeĥaj Fervojoj (ČD) akceptis proponon de kompanio *Stadler*. Modernajn basplankajn pasaĝervagonojn *Regio Shuttle* la fabrikisto liveros fine de 2011 kaj dum la jaro 2012. La veturiloj proponos proksimume po 70 sidlokoj kaj sufiĉan spacon por transporto de bagaĝoj, bicikloj kaj infanĉaretoj. Memkompreneble enestos klimatizo kaj senbarieraj necesejoj por handikapuloj sur ĉaretoj, kun fermita sistemo. En konstrumodifo por regiono *Liberec* oni kalkulas kun rapido ĝis 100 km/h kaj kun eblo trafiki ankaŭ sur la ĉeĥa plej kruta fervoja linio el *Tanvald* al *Kořenov*. En kazo de *Vysočina* ili estos konstruitaj por rapido ĝis 120 km/h. Entute oni liveros 16 veturilojn por regiono *Liberec* kaj 17 por *Vysočina*. Veturilojn de tipo *Regio Shuttle RS 1* la firmao jam vendis al diversaj klientoj en nombro de pli ol 400 ekzempleroj.

**Francio : centralizita trajntrafikregado por duonmiliardo da eŭroj -** Fine de junio 2010 en franca *Lyon* oni ekfunkciigis novan regcentrejon por regiono *Rhône-Alpes*. Nuntempe ĉi tie la trajntrafikon reguligas 40 trajntrafikestroj. Dum malpli ol dudek jaroj oni povos ĉiujn trakforkojn kaj signalilojn sur ĉiuj fervojlinioj en la regiono *Rhône-Alpes* regi el tiu ĉi nova centrejo, kies konstruo postulis duonmiliardon da eŭroj. Tiu ĉi regcentrejo prezentas gvidprogramon por la kompanio *RFF*. En tuta Francio povus aperi dekkvin similaj regcentrejoj.

**Ĉeĥio : Ĉeĥa lokomotivo per tergaso -** En internacia maŝinkonstrua foiro en urbo *Brno* en septembro 2010 estis ekspoziciata lokomotivo kun propulsado per kunpremita tergaso. La duradaksa maŝino 703.821-9 kun movo per gaso *CN*G aperis en la jaroj 2009 ĝis 2010 dank´ al vastampleksa modifo el origina lokomotivo 703.023-2. La ŝanĝo realiĝis dank´ al komuna kooperado de la firmaoj *Vítkovice Doprava*, *ČD Cargo* kaj *VUZ*. Malpli brua idlado de la lokomotivo ebligas malgrandigi bruon en kondukistejo de originaj 83 al nunaj 74 dB. La maŝino ankaŭ bezonas malpli da brulaĵo ol en origina stato kun dizelelektra motoro. La gaslokomotivo havas motoron de ĉeĥa fabrikisto *TEDOM* kun tipa marko *TG 250AV*. La lokomotivo estas destinita por leĝera manovra servo sur akcesora trakaro kaj trenado de malpezaj vartrajnoj, kaj ĝi atingas maksimuman rapidon 40 km/h.

**Hungario : ministerio de trafiko ? Nebezonata -** Balotoj en Hungario,

okazintaj en aprilo 2010, alportis ankaŭ politikajn ŝanĝojn, i.a. en nombro de ŝtataj ministerioj. Anstataŭ dektri nun estas nur ok. Administrado kaj agendo de nuligita Ministerio de trafiko estis transdonitaj al la nove fondita Ministerio por nacia evoluigo. Nova ministro fariĝis ĝistiama ministro de trafiko, la kvindekkvarjara juristo *Tamas Fellegy*. Pri trafiko en la „nova" ministerio respondecas ŝtata sekretario *Janos Fomagy*.

**Hispanio : al aŭtomobilfabrikoj mankas longaj trajnoj -** Malmultaj entrafikigataj longaj trajnoj kaj altaj elspezoj por energio faras por fabrikistoj de aŭtomobiloj uzadon de fervoja trafiko neprofitiga. Al tiu ĉi konkludo venis studaĵo de hispana asocio de aŭtomobila industrio *ANFAC*. Se estus pli multaj 750 metrojn longaj trajnoj, aŭtomobilfabrikistoj povus ŝpari ĉirkaŭ 30% da loĝistikaj elspezoj. Nuntempe estas plejparte entrafikigataj trajnoj 450 m longaj, konsidere de montetara regiono kaj multaj kurbiĝoj de fervoja linio.

**Ĉeĥio : kiu posedas entreprenon *Škoda Transportation* -** Unu el la plej grandaj ĉeĥaj ekonomiaj entreprenoj kaj la plej grava fabrikisto de trakveturiloj en Ĉeĥa respubliko ŝanĝis la posedanton. Novaj posedantoj de *Škoda Transportation*, la lasta konstrua entrepreno sub flugiloj de *Škoda Holding* en *Plzeň*, fariĝis kvar fizikaj personoj : du estas ĉefaj profesiaj gvidantoj de la holdingo, ĝia ĝenerala direktoro *Tomáš Krsek*, kaj la dua plej grava viro *Michal Korecký*. Pluaj posedantoj fariĝis *Marek Čmela* kaj *Jiří Diviš*, profesiaj gvidantoj de eksterlanda investa kompanio *Appian*. Tiu ĉi kiel ĝistiama centprocenta posedanto vendis akciojn al ĉiuj kvar personoj. La entrepreno tiele akiris tute travideblajn posedantojn. Al divizio *Transportation* apartenas *Škoda Transportation* en *Plzeň*, *Škoda Vagonka* (*Škoda* Vagonejo), *Pars Nova Šumperk*, *MOVO Plzeň*, fabrikisto de trolebusoj kaj trakciaj moviloj *Škoda Electric*, evoluada bazo kaj akredita provejo *VÚKD Praha* kaj fabrikisto de povuma elektrotekniko *POLI* en *Praha*.

**Pollando : konflikto kun sindikatoj pri alto de kompenspago -** Kompanio *DB Schenker Rail* estis en konflikto kun sindikata organizaĵo Solidareco. Germanaj Fervojoj en 2009 ekposedis privatan vartrafikan fervojlinion *PCC Rail* kaj kun ĝi kunligitan *PTK Holding* (Entrepreno Fervoja Transporto kun sidejo en *Zabrze*), kaj envicigis ilin sub tegmento *DB Schenker Rail Polska*. Konflikto aperis pri alto de kompenspago. *DB* proponis sep monatsalajrojn, do plejmulte 35 mil zlotojn por ĉiu maldungata dungito. En sia duonjara raporto *DB* konstatis „nekontentigajn ekonomiajn rezultojn" de sia filio en Pollando.

**Svisio : tunelo apud *Grindelwald* estos 700 m longa -** Svisa privata kompanio *Berner Oberland – Bahnen* (*BOB*) planas sur fervojlinio *Interlaken – Grindelwald* inter stacioj *Zweilütschinen* kaj *Lütschentan* konstrui 700 metrojn longan tunelon. Tiu ĉi malebligu defalojn de lavangoj, ŝtonoj, respektive de faligita ligno. Nuntempe la linio estas ŝirmata nur per originaj rokgalerioj.

Konstrukostoj de la nova tunelo estas taksataj je 20 milionoj da svisaj frankoj. Oni planas komenci konstruon de la nova tunelo en printempo de 2011. Sur la nova parto oni rektigos la fervojlinion.

*(Preparis Jindřich Tomíšek)*

*(Reviziis Heinz Hoffmann)*